

& Ne okazas duaj fojoj:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Wisława Szymborska (Vokado al Jetio, 1957). Tradukis Lidia Ligęza (Mi inventas la mondon, 2015). Baladigis Martin Strid (2016) per sveda ŝotiso laŭ Karl Gudmundsäter kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/LaSi LaTi dodo dodo; LaSi Lado TiTi TiTi; MiMa MiSi Tire doTi; LaTi LaSi MiMi MiMi;

(#Rekantaĵe: MiSi TiLa Si Mi; Mimi mire do La; Lado TiLa SiMi SiTi; TiLa LaSi Mi i; TiLa LaSi MiSi La a)

)×7)+

(& Strofoj:

'1 /Ne okazas duaj fojoj, ; nek okazos.
Jen pro kio ; ni naskiĝis spertomankaj ;
kaj ni mortos sen rutino.

(×:Paŝu kun fiero ; Paŝu sur la tero ;
Jen mi venas, ĉene tenas ; Paŝu kun
fier' ; Paŝu sur la firma ter'.)

'2 Se eĉ estus ni lernantoj ; plej obtuzaj
sur la tero ; ni sukcesus ripetadi ; nek
printempon, nek someron.

'3 Ne ripetos ni la tagon, ; post la nokt'
ne venos biso, ; ne identas duan fojon ;
la rigardo, premo, kiso.

'4 Laste, kiam iu laŭte ; ĉe mi diris vian
nomon ; estis al mi kvazaŭ rozo ; trans
fenestro falus domon.

'5 Nun, kiam ni estas kune ; mi rigardas
la plafonon. ; Rozo? Kiel ĝi aspektas? ;
Ĉu ĝi – flor'? Aŭ eble ŝtono?

'6 Kial vi, malica horo ; al malcert' kaj
tim' nin pelas? ; Venis vi – do devas
pasi, ; pasos vi – kaj tio belas.

'7 Ridetante, brakumante ; reatingas ni
trankvilon, ; kvankam, kiel du akveroj,
; ni prezentas malsimilon.)